# *Kubo konfirmas sindevontigon por nuklea malarmado*

*Image not found or type unknown*

**Foto: Studio Revolución**

Havano, apr 2 (RHK) La Unua Sekretario de la Centra Komitato de la Partio kaj Prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel Bermúdez, reasertis la sindevontigon de Kubo al la batalo por la Paco kaj la nedisvastigo de nukleaj armiloj en renkonti?o kun Robert Floyd, Plenuma Direktoro de la Organizo pri Ampleksa Nuklea Test-Malpermeso.

Díaz-Canel aprezis la klopodojn de Floyd por establi efikan konfirmsistemon kaj elstarigis la gravecon de la organizo en trejnado de fakuloj en la lando. Krome, li menciis, ke tiu ?i vizito plifortigas la rilatojn de Kubo kun diversaj institucioj rilataj al scienco kaj civila defendo.

Lia Ekscelenco Robert Floyd la?dis  la pozicion de Kubo pri la nedisvastigo de nukleaj armiloj dum sia vizito al la insulo. Floyd, direktoro de la Organizo pri Ampleksa Nuklea Test-Malpermeso-Traktato, renkonti?is kun altrangaj kubaj oficistoj.

Raportas: D. Villaurrutia

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/380026-kubo-konfirmas-sindevontigon-por-nuklea-malarmado

Radio Habana Cuba